nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2019

## KUNVOKO DE ĜENERALA KUNSIDO DE MEL

Alvoko por la membroj de Madrida Esperanto-Liceo (MEL),

Konforme al statuto, kaj laŭ indiko de la Prezidento, oni alvokas ĉiujn membrojn por ĝenerala kunsido, okazonta la 3an junio 2019, je la 18:15 (unua alvoko) kaj je la 18:30 (dua alvoko), en la sidejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro, 13 – 3º - 7ª, de Madrido, por pritrakti la sekvan aferon:

– Decido prenenda de MEL pri ĝia voĉdono por elekti kvin komitatanojn B de la Universala Esperanto-Asocio (UEA), al kiu MEL apartenas.

– Demandoj, petoj, proponoj.

Homoj kiuj ne povas aŭ ne volas ĉeesti, rajtas transdoni sian voĉdon-rajton al alia ĉeestonta membro, pere de mesaĝo al madrid@esperanto.es . Sammaniere, se oni havas deciditan onian kvin voĉdonojn por komitatano B, oni povas transdoni la voĉdon-rajton al Sekretario de MEL indikante kiuj kvin oni taksas voĉdonindaj de MEL, kaj Sekretario aldonos tiujn opiniojn al tiujn kiujn oni prezentos en la ĝenerala asembleo; faru ankaŭ pere de mesaĝo al madrid@esperanto.es.

Komprenu ke temas pri la decido de MEL. Se vi estas individua membro de UEA, vi havas rektan voĉdon-rajton, kiun vi povos plenumi en la maniero ke UEA rakontos al vi. Ĉi tie temas pri la voĉdono de MEL mem, do, se vi estas MELano, vi povas partopreni en tiu venonta asembleo eĉ se vi ne apartenas al UEA.

Se vi ricevas tiun kunvokon, kaj vi ne apartenas al MEL, memoru: vi ankoraŭ povas aliĝi al ĉi madrida klubo de la esperanta movado, per nur plenumado de aliĝilo kaj jarkotizo de nur 6 eŭroj. Se vi volas aliĝi, venu en asembleon la 3an junio kaj vi povos partopreni ankaŭ en ĉi-tiama voĉdonado.

Por ke vi povu antaŭ konsideri kiuj kandidatoj meritas vian subtenon, informojn pri ili ĉiuj eblas legi en https://UEA.org/asocio/kkb2019, kaj kelkaj respondis pri siaj programoj en: Libera Folio: https://www.liberafolio.org/

## REKOMENCIĜAS RENKONTOJ EN PARKO

La sabataj renkontoj por babili en Esperanto, post la komenco de la (esperenble) varma sezono, denove translokiĝos al la parko Retiro. Ni rendevuos la 8an de junio (atentu, ne la unuan sabaton), je la 6-a horo, apud la statuo de Ricardo Codorniu, tre proksime al la Vitra Palaco (Palacio de Cristal, apud kiu vi povas aliri, se vi ne scias kie troviĝas la statuo, kaj iu iros renkonte al vi).

Ni faros ankaŭ alvokon pere de forumoj por lernantoj (Duolingo, ktp), por instigi partoprenon por novuloj. Bv disvastigi al aliaj esperantistoj. Portu trinkaĵon, manĝeton, aŭ kion vi konsideru oportuna por pasigi belan printempan renkonton.

Aliflanke, la 17an de majo, en la sidejo, ni reprenos la kutimon organizi literaturan rondon. Ni legos kaj kune komentos pecojn de la libro de Stefan MacGill: "La laŭta vekhorloĝo kaj aliaj atentokaptiloj".

## OKAZIS EN MAJO

Kiel ni anoncis en pasinta numero, madridanoj povis ĝui plurajn okazaĵojn rekte aŭ nerekte rilatajn al Esperanto.

**nia voĉo** **junio 2019**

Pluraj madridanoj ĉeestis la Triopan Kongreson de Esperanto en Malago, kaj kelkokaze ĉefrolis en iuj ties programeroj. La renkonto estis partoprenita de ĉ. 170 homoj, inter kiuj lastatempe aliĝis la pranepino de Dr. Zamenhof, Margareta Zaleski-Zamenhof. Filmojn pri ĝi eblas jam sekti en la jutuba kanalo de HEF, https://www.youtube.com/user/esesperanto.




La 10an de majo pluraj esperantistoj (vidu apude foton) ĉeestis la prezentadon de la libro: «De Gandesa a Grossbeeren. De defender la República a los campos nazis» de Gemma Masip, fratino de la konata esperantisto Farri, kiu rakontis pri la sperto de ilia patro, kiu estis unu el tiuj nomataj "sklavoj de Hitlero", laboristoj kiuj estis translokitaj al Germanio ene de la akordoj inter la tiam aliancitaj registaroj de Hispanio kaj Germanio kaj ekspluatitaj de la tiea reĝimo.

Grupo de esperantistoj kolektive vizitis ankaŭ la ekspozicion pri edukado titolitan "Madrid, ciudad educadora 1898/1938 – Memoria de la Escuela Pública" en la Muzeo de Historio de la urbo Madrido. Kiel ni informis, aperas tie videoprofilo pri iama prezidanto de Hispana Esperanto-asocio, kaj ĉefrolulo de la renovigo de pedagogio, Sidonio Pintado, kun mencio al la rolo de Esperanto en liaj internaciaj kontaktoj. La ekspozicio estos montrata ĝis la 1a de septembro, kaj la eniro estas senpaga.

La sabaton 25an de majo estis organizita nova omaĝo al la poeto José Agustín Goytisolo, okaze de la 20a datreveno de lia morto. Ĉifoje ĝi okazis en la Ateneo de Madrido, kun partopreno kaj kunorganizado de la Esperanto-poeto Miguel Fernández, kiu deklamis en la internacia lingvo.

Aliflanke, en la maja numero de la urbodoma revuo M21 oni mencias al Adelaida las Santas, forpasinta membro de MEL kaj kunfondantino kune kun Gloria Fuertes de la parolrondo "Versos con faldas". Adelaida, kiu ankaŭ estis eldonisto, eldonis en sia kolekto Aguacantos, la tradukon al Esperanto farita de Miguel Fernandez, de la rakonto "La blua hundo", de ŝia edzo Guillermo Osorio.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. La sabata renkontiĝo okazos la 8an de junio, kiel antaŭe menciite.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com